# La februara sesio

"Interlingvistikaj Studoj UAM" <interlin@amu.edu.pl>

收件人: "ZHANG Ping (Ĝoja) (张平)" <perfectgoja@163.com>, "PAN Zhongwu (Panĉjo) (潘忠武)" <mzboya@126.com>, "PARK Soo-hyean (Elstara) (박수현)" <elstara@saluton.net>, "GIM Inhye (Ella) (김인혜)" <kih4860@naver.com>, "Yuro JUNG (Unika) (정유로)" <seto.kai.nika@gmail.com>

抄 送: "Ilona Koutny" <ilona.koutny@amu.edu.pl>

时 间: 2017-10-1 18:39:35

附 件: 20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj, la 1a sesio k si... 下载附件
20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj, la 1a sesio k si... 下载附件
打包下载全部附件

Karaj!

Mi esperas, ke vi jam ripozis post longa vojaĝo kaj povas trankvile rememori vian restadon en Poznań.

Nun mi sendas al vi la datojn de la februara sesio. Ĝi okazas ĉiam dum la unua semajno de februaro, do en la jaro 2018 la sesio okazos inter sabato la 3-a de februaro kaj vendredo la 9-a de februaro 2018 (+ sabata ekskurso la 10-an de februaro).

=================
LA SESIO (3-10.02.2018)
=================

La ritmo ĉiam estas la sama: sabate, je la 14:30 horo okazas konsultiĝo antaŭ la ekzamenoj, dum kiu prof. Ilona Koutny priparolos kun kun la grupo la plej gravajn aferojn, pri kiuj la studentoj estos ekzamenataj dimanĉe kaj merkrede.

Ekde nun la sesioj okazos laŭ la sekva skemo (la unua sesio estis escepto).

Kursotagoj: 4 kursoj po 10 horoj de la 9-a matene ĝis la 18-a kun paŭzoj (same kiel okazis en septembro).

Ekzamentagoj: ĉiam dimanĉe kaj merkrede. Temas kutime pri parolaj ekzamenoj, sed povas okazi ankaŭ io skriba. Februare 2018 okazos tri ekzamenoj: pri kulturo, fonetiko kaj literaturo. La ekzameno kaj la dua parto de la kurso pri interlingvistiko okazos septembre 2018.

Jen la skemo de ĉiu februara sesio:

2.02.2018, vendredo - se necese, oni povas alveni jam vendrede, sed nenio okazos dum tiu tago

3.02.2018, sabato - konsultiĝo ekde la 14:30 - la plej multaj studentoj alvenas sabate matene/tagmeze

4.02.2018, dimanĉo - ekzamenoj ekde la 9-a horo

5.02.2018, lundo - prelegoj ĝis vespero

6.02.2018, mardo - prelegoj ĝis vespero

7.02.2018, merkredo - ekzamenoj ekde la 9-a horo,
merkrede vespere: "komuna vespero" (kun lokaj esperantistoj, kuna manĝeto, trinketo kaj programetoj - bv. pripensi vian kontribuon)

8.02.2018, ĵaŭdo - prelegoj ĝis vespero

9.02.2018, vendredo - prelegoj ĝis vespero

10.02.2018, sabato - tuttaga ekskurso, reveno malfruvespere

11.02.2018, dimanĉo - forveturo

Detalan programon prof. Ilona Koutny sendos al vi tuj antaŭ la sesio. Pri la kostoj de la komuna vespero kaj de la ekskurso mi jam skribis al vi antaŭ la unua sesio. Bv. relegi ĉiujn informojn de la dosiero KOMUNA INFORMLETERO, dissendita ĉ. la 20-a de aŭgusto 2017 (temo de la mesaĝo: Novaj informoj pri la Studoj).

=================
JOWITA
=================

Nun mi petas pri rapida decido pri la mendota ĉambro en Jowita. Ĉi-foje ni povas ricevi nur ĉambrojn en la hotela parto de Jowita (etaĝoj 1 kaj A). La studentajn ĉambrojn okupas februare la ĉeestaj studentoj. Bv. decidi, ĉu vi preferas pagi pli multe kaj loĝi sola, aŭ vi ŝatus loĝi kun alia persono kaj pagi malpli multe. Se vi jam interkonsentis kun iu, ke vi volas loĝi kune, bv. informi min pri tio.

La prezoj estas:
86,40 zlotoj / nokto por unulita ĉambro,
64,80 zlotoj / nokto / persono por dulita ĉambro.
La prezo de hotela ĉambro en Jowita entenas matenmanĝon, oni ne pagas aparte, sed ankaŭ ne povas rezigni pri la pago por matenmanĝoj.

Mi mendas provizore por ĉiuj por la datoj 2-11.02.2018 (la unua nokto 2/3.02, la lasta nokto 10/11.02) kaj petas vin precizigi la datojn tuj post la aĉeto de biletoj, por ke mi povu malmendi la nokton 2/3.02.2018, se ne estos bezonata. Bv. bone pripensi la planojn kaj ne fari kiel okazis septembre, ke iuj mendis ekde sabato kaj alvenis jam vendrede malfruvespere - povas ja okazi surloke, ke ne estas libera ĉambro! Se iu preferas tranokti en alia loko, ne en Jowita, bv. nepre informi min pri tio, por ke mi povu tuj malmendi la ĉambron en Jowita.

====================
RAPORTO PRI LA UNUA SESIO
====================

Mi aldonas la raporton de Ilona Koutny en du formatoj: kiel DOC kaj ankaŭ kiel PDF por tiuj, kiuj ne povas legi niajn doc-dokumentojn.

====================
PETO PRI KONFIRMO
====================

Mi tre petas vin, konfirmi la ricevon de mia mesaĝo.

Dezirante ĉion bonan kaj atendante vian reagon,
kore salutas vin Gosia